Jaro VII. N-o 9. MONATA Julio 1924.

# LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20·—, fremdlando: bonvaluta Kĉ 25·— (5 sv. fr.) malbonvaluta Kĉ 15·— (3 sv. fr.) Konto de la ĉekoficejo Praha n-ro 34.271.

## GRAVAJ INFORMOJ POR KONGRESANOJ

**Fervoja rabato 33%, aŭ 50% en Ĉeĥoslovakio. — Urbo Praha disponigas tramon por rondvojaĝo de esp. karavano tra Praha.**

(Oficiala komuniko de Ĉeĥoslovaka Asocio Esp.) — (Aliaj gazetoj bonvole represu.)

1. PASPORTVIZA RABATO

Ĉiu kongresano prezentante ĉe la ĉeĥoslovaka konsulejo la kongresan karton ricevos 50% rabaton je vizkosto travetura aŭ restada. (Laŭ informo de ĈEI.)

2. FERVOJA RABATO

Laŭ la peto de Ĉs. Asocio Esp. de la 11./6., la ministerio de fervojoj koncedas per sia dekreto de 5. Julio N-ro 40509-III/3 jenajn rabatojn sur ĉiuj fervojoj ĉeĥoslovakaj en kiu ajn klaso de ordinara aŭ rapida vagonaro, validajn inter la 4—23 Aŭgusto incl.:

a) *Ĉsl. kongresanoj* ricevos *33% rabaton,* se ili prezentos ĉe la stacidoma kaso siajn kongresan karton kaj pasporton. Estas necese aĉeti bileton ĝis aŭstria limstacio, sed oni povas unufoje interrompi la veturon. La interrompon anoncu en la stacia oficejo. Rabato validas ankaŭ por la reveno.

b) *Eksterlandaj kongresanoj* traveturantaj Ĉeĥoslovakion ricevos *ankaŭ 33% rabaton.* Necesas prezenti en la enira limstacio la kongresan karton kun pasporto kaj aĉeti tie bileton ĝis elira limstacio. Validas ankaŭ por revena traveturo. Interrompo ebla kiel sub a).

c) *Al grupoj da eksterlandaj kongresanoj,* kiuj inter la 4.—23. Aŭgusto volas viziti Ĉeĥoslovakion (grotojn de Macocha, montaron Tatry, banlokojn Luhačovice, Poděbrady, Karlovy Vary, Františkovy Lázně, Marianské Lázně, banlokojn en Slovakio aŭ iun ajn alian lokon) estos donita por la tuta vojo, kiun ili elektos

*rabato 50%*

kiun ricevos ankaŭ ĉeĥoslovaka samideano ilin akompananta. Necesas anonci tion al Ĉsl. Asocio Esp. (Praha VII, Sochařská, 333) aŭ en Wien al S-roj Ginz aŭ Hromada (Kongresa oficejo), kiuj havigos la komunan rabatilon kaj gvidanton. Tiu gvidanto devas havi skriban dokumenton donotan de Ĉsl. Asocio Esp. pri tio, ke li estas komisiita esti gvidanto.

3. KARAVANO BERLIN - PRAHA - WIEN

Specialajn aranĝojn ni preparis por kongresanoj el norda Eŭropo, kiuj aliĝos al karavano de S-ro M. Blankenheim, Ĉefdel. de UEA, Berlin - Steglitz, Stubenrauchplatz, 5, forveturonta marde la 5. Aŭgusto matene el Berlin kaj alvenonta al Praha posttagmeze je la 16 horo (stacidomo Wilson).

*Fervoja rabato 50%,* se la biletoj estos aĉetitaj en ĉeĥa limstacio Děčín-Podmokly (Tetschen-Bodenbach) ĝis la ĉs.-aŭstria limstacio České Velenice (Gmünd) kaj se la veturo estos interrompita en Praha, laŭ la programo. Validas ankaŭ por reveturo, nature sen plua interrompo en Praha. Ŝparo dum ambaŭ veturoj ĉ. 80 Kč (12 sv. fr., 10 orm., t. e. kosto de unutaga bona restado en Praha kun loĝo kaj manĝo). La komunan rabatilon reprez. de ĈAE transdonos en la limstacio al la karavanestro. — Ĉar en sia 2. komuniko S-ro Blanken-

heim rekomendas aĉeti bileton ĉe iu vojaĝa oficejo en Berlin, ni atentigas, ke tiu ĉi 50% rabato validas sole por tiu, kiu aĉetos bileton nur en la ĉeĥa limstacio. Aĉetu do bileton sole ĝis Děčín-Podmokly, la ceteron ni prizorgos.

*En Praha* specialaj, grandaj tramvagonoj senpage disponigitaj al ĈAE de la Urbaj Elektraj Entreprenoj, transportos la karavanon al ĝia hotelo. Por ebligi al gastoj vidi oportune en 2—3 horoj la tutan urbon, tiuj ĉi vagonoj poste veturos kun ili de la hotelo tra la urbo. Klarigado en esperanto memkompreneble prizorgota de membroj de Esperantista Klubo en Praha.

*Vespere.* Post la komuna vespermanĝo en la hotelo de la karavano, amika kunveno, kune kun Prahaj samideanoj, kun iom da programo.

*Loĝigo.* La tuta karavano loĝos en la sama hotelo. Prezoj de ĉambroj: Unulitaj: I. etaĝo 26 aŭ 28 Kč, II. et. 22 aŭ 26 Kč, III et. 21 aŭ 24 Kč, IV. et. 16 Kč. Dulitaj: I. et. 60 Kč, II. et. 54 Kč, III. et. 48 aŭ 54 Kč, IV. et. 30 aŭ 34 Kč (Ĉambroj alstrataj aŭ alkortaj). En tiuj ĉi prezoj ĉio enkalkulita (servo, lumo, impostoj); pagota plie nur trinkmono, ĉ. 10%.

Estas necese skribi ĝis 1. Aŭgusto al S-ro Blankenheim en Berlin aŭ al Ĉsl. Asocio en Praha, kiun ĉambron kaj por kiu prezo vi deziras. Kontentigo garantiata sole al la ĝustatempe aliĝintaj.

*Forveturo* per speciala vagono kune kun ĉs. kongresanoj la 6. Aŭgusto je la 7a matene st. Wilson. Alveno Wien je la 14·30.

*Kotizo* por aranĝoj en Praha: Neniu. Ni ĝojos, se vi venos. Via vizito havas por ni grandan propagandan valoron.

Kontentaj, ke ni povas doni al vi tiajn ĉi informojn, ni ĝojas je la revido, ĉiam pretaj plenumi specialajn dezirojn.

**Esperantista Klubo Praha.**
*Koutek - Mothejzík.*

**Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista.**
*Eiselt - Hromada.*

## PROGRAMO DE LA XVIa. KONGRESO

Laŭ la lastaj informoj jen la programo, kiu lastamomente povos ricevi malgrandajn ŝanĝojn:

*Merkrede,* la 6./8. vespere salutkunveno (interkonatiĝa vespero).

*Ĵaŭde,* la 7./8., preparaj kunsidoj de kongreskomitatoj. Je la 10a horo solena malfermo de la XVIa, proklamo de la internaj laboroj. Posttagmeze laborkunsidoj aŭ promenadoj tra la urbo. Vespere la unuaj malgrandaj, sed bone preparitaj amuzoj.

*Vendrede,* la 8./8., tutan tagon fakaj kunsidoj, kiuj preparas raportojn, proponojn, rezoluciojn por la kongreskomitato, uzotajn laŭeble en la ĉefkunsidoj de la 11. kaj 13. Aŭgusto. Promenadoj laŭvole. Vespere amuzoj.

*Sabate,* la 9./8., finiĝo de la fakaj kunsidoj, lastaj preparaj kunsidoj de la kongreskomitatoj, elekto de la naciaj reprezentantoj kaj de la fakaj raportontoj. Vespere granda kunveno solena en la ampleksa kongresejo.

*Dimanĉe,* la 10./8., je la 11a matene la publika manifestacio de esperanto antaŭ honorgastoj, laŭ grandstila, zorge preparita detala programo, en ĝia formo novaĵo por la tutmonda esperantistaro. Posttagmeze agrablaj nelacigaj aranĝoj. Vespere grandstila festa koncerto, kabaredoj kaj diversaj aliaj amuzoj.

*Lunde,* la 11./8., daŭrigo de la salutoj de naciaj kaj fakaj delegitoj, se eble, jam raportoj, tre mallongaj, koncizaj; koncerto, vespere teatro, samtempe aliaj elektitaj amuzoj.

*Marde,* la 12./8., daŭrigo de raportoj kaj proponoj, eble ankaŭ gravaj paroladoj; posttagmeze kaj vespere ekskursoj, koncerto, spritaj lumbildparoladoj, teatro, kabaredoj naciaj kaj internaciaj ktp.

*Merkrede,* la 13./8., antaŭ la solena, sed denove interna fermo de la kongreso, proponoj, deziroj, decidoj prezentataj al la kongresanaro. Posttagmeze kaj vespere adiaŭaj kunveno kun riĉa programo. Ĝandenfesto. Naciaj dancoj.

## AL ĈEĤOSLOVAKAJ KONGRESANOJ

Sekve de tio, ke la fervoja ministerio plenumis la peton de Ĉs. Asocio Esp. pri rabatoj, ŝanĝiĝas aranĝoj, priparolitaj en „La Progreso" p. 95. kaj „Marto" p. 48.:

1) Ne estas necese anonci aliĝon al la karavano por havi rabaton 20%, ĉar ĉiu unuopa kongresano ricevos rabaton 33% jam el sia hejma stacio (vidu detalojn supre en Gravaj informoj).

2) La aŭstria vizo estos konsiderinde malaltigita post la 1. Aŭgusto. La pasportojn jam senditajn al ĈAE ni vizumigos tuj post tiu ĉi dato kaj tuj resendos al posedanto. Ankaŭ oni povas mem sendi la pasporton al la konsulejo (Praha-II., Krakovská) almetante 20 Kč, sed ĈAE prizorgos pli rapide.

3) Sendante pasporton al ĈAE, vi almetu ĉiuokaze afrankon por resendo, ĉar vi bezonos la pasporton kun kongresa karto por ricevi rabatitan bileton en via hejma stacio. Almetu Kč 22 anst. 36 Kč.

4) La vojaĝo Praha—České Velenice kostas 42·40 Kč, kun 33% rabato sole 30 Kč. La veturo České Velenice—Gmünd—Wien 48.000 Kr (24 Kč), entute 54 Kč.

5) Ne forgesu, ke interrompante la vojaĝon, ekz. en Praha, vi devas anonci tion en la oficejo stacia kaj daŭrigi la vojaĝon la saman aŭ la sekvantan tagon (§ 25. de la transporta ordonaro).

6) Pasportaj faciligoj, v. p. 107.

## VENU POST LA KONGRESO AL PRAHA KAJ GROTARO ĈE MACOCHA!

Norde de la Moravia ĉefurbo Brno, sur la ĉefa f.rvoja linio al Praha, en la regiono Moravia Karsto, troviĝas la fama abismo Macocha kun labirinto de subteraj grotoj kaj koridoroj, plenaj de fabelformaj gutŝtonoj, stalagmitoj kaj stalaktitoj. — La karavano foriranta el Wien la 14./8. matene al Praha, interrompos la vojaĝon en stacio Blansko kaj uzos la tempon por oportune vidi tiun ĉi unikaĵon, kiu kelkloke superas eĉ la faman groton en Belgio.



El Moravia Karsto

De la stacio, aŭtobusoj en 20 minutoj transportas nin (bileto 8 Kč por ambaŭ veturoj) al la enirejo en rokoj, tra kiu ni malsupreniros sub la teron por veni al Antaŭa grotego. Jen iom el vidotaĵoj:

Pendanta gutŝtono 4 m longa. — Rigida akvofalo. — Fajlilformaj stalaktitoj blankaj kaj flavaj. — Galerio gutŝtona. — Kurtenoj. — „Brilianto“. — „Kalvario“. — Tra Koridoro oni venas al Malantaŭa Grotego. — Bizaraj formoj. — „Kasteleto“. — Ĝiba pigmeo. — Neĝeblanka „vazo“ — tutmonda unikaĵo karsta. — „Palmaj folioj“. — Tra tunelo (40 m) oni venas al la taglumo kaj troviĝas sur la fundo — de la abismo Macocha. Alte sur ponteto vidiĝas nigraj punktoj — homoj.

Elirinte post promenado (tri kvaronhoroj) oni foriras al proksimaj Grotoj de Masaryk, trovitaj en 1920. Ŝipe moviĝante sur subteraj akvoj oni pasas lokojn plenajn de gutŝtonoj, ĉiam ankoraŭ kreiĝantaj, brilantaj en elektra lumo per eksterordinara pureco. Bizaraj formoj, jen neĝe blankaj, jen travideblaj kiel vitro — fabelo.

**Atentu la detalojn sur afiŝo en la kongresejo.**

## POSTKONGRESAJ KARAVANOJ AL Ĉ. S. R.

Ni atentigas la kongresanojn pri la 50% rabato viza kaj fervoja, kiun rajtas ricevi en Ĉeĥoslovaka Respubliko grupoj da eksterlandaj kongresanoj. Estas aranĝataj postkongresaj vojaĝoj:

1. Al Praha tra abismo Macocha kaj grotoj stalagmitaj apud Blansko. La karavano gvidata de ĉs. samideano forveturos el Wien ĵaŭde la 14. Aŭgusto je la 5·55 matene (Nordbahnhof) tra Břeclava kaj Brno al Blansko. Alveno post la 10a horo matene. Vizito de grotoj. Aŭtobuso tien kaj reen 8 Kč. Esperanta klarigado. Mondfamaj subteraj grotoj, plenaj de fabelformaj gutŝtonoj (stalagmitoj kaj stalaktitoj) de unike pura beleco. Daŭrigo de la vojaĝo al Praha je 17·30, alveno Praha 21.30. Loĝejoj prizorgitaj. Prezojn vidu supre en Gravaj informoj por kongresanoj. Dutaga restado en Praha sub zorgo de Prahaj samideanoj.

2) Al montaro Tatry en Slovakio kun montaraj lagoj kaj luksaj banlokoj. Forveturo ankaŭ ĵaŭde la 14./8., je la 9a horo matene per tramo (stacio Grossmarkthalle) al Bratislava, ĉefurbo de Slovakio. De tie rapidvagonare je la 12·26 tra Pieštany, Žilina al Štrba (19·37) aŭ Poprad Velka (20·32). Detaloj sur granda afiŝo en la kongresejo.

Aliĝojn sendu laŭ adreso de Ĉsl. Asosio, Kongresa oficejo. Atentu la afiŝon en la kongresejo.

## ESPERANTA MOVADO

### Lingva Komitato

Laŭ instrukcioj de S-ro Cart, prezidanto de Akademio, kiu malsaniĝinte de kelka tempo, ĵus estis ĥirurgie operaciita, lia sekretario, S-ro René de Lajarte, informas nin pri la rezultato de kompletigaj elektoj por L. K.

Voĉdonis 79 L. K. -anoj. Reelektitaj estis 11 malnovaj membroj: S-roj Bünemann (74 voĉoj), Bulthuis kaj Fischer (71 v.), S-ino Flourens-Roksano (70), S-ro Arnhold (69), S-ino Reed-Kellermann (68), S-roj Rohrbach (67), Reed (66), Bianchini, Degon kaj Underhill (64).

Nove elektitaj estis: S-roj Rousseau (76), D-ro Kamaryt (75), Obručev (74), Baghy (72) kaj Jodko (60).

El la 5 novaj Lingvokomitatanoj estas: 1 Franco, 1 Hungaro, 2 Rusoj kaj 1 Ĉeĥoslovako.

Por ni tre ĝojiga fakto estas la elekto de D-ro Stan. Kamaryt (Bratislava, Telocvičná 3), nia kunredaktoro kaj vicprez. de Ĉsl. Asocio Esp. Ni gratulas al L. K., ke eniras ĝin persono tiom kompetenta, kies sciencaj artikoloj estas troveblaj jam en Scienca Revuo (1907—9), Bohema Esperantisto (1907—12); Nova Eŭropo (1921—22) kaj Progreso.

La ĉeĥoslovaka lingvo estas do reprezentita en L. K. per jenaj membroj: Hromada, Kamaryt, Kühnl (Akademiano), Pitlík kaj Šupichová.

**Universala Esperantista Pacifista Asocio kaj Paca Societo de Chelčický, Praha** petis nin publikigi la jenan alvokon okaze de la 10jara datreveno de eksplodo de la mondmilito.

La 26an de julio 1924.

*Al la tutmonda samcelanaro!*

Pleniĝis la unua jardeko depost deklaro de la mondmilito, en kiu partoprenis efektive la tuta mondo. Ĝi estas ankoraŭ en bona memoro de ni ĉiuj, ni ja senpere sentas ĝiajn malbonajn sekvojn. Ni vidas ĉirkaŭe la kripligitajn, blindigitajn invalidojn, ni aŭdas dolore priplori la mortintajn soldatojn, nin terurigas la malmoraleco de l' junularo kaj de l' plenaĝuloj, ni suferegas sub la premo de ekonomiaj ŝarĝoj. Tiaj estas la sekvoj de la milito, kiun eksplodigis la despotismo, memfiereco kaj krimeco en la respondaj rondoj regnestraj! Ni estis devigataj silente kaj pasive alrigardi, kiam oni incitegis nacion kontraŭ nacio, kiam oni sur bazo de mensogaj fajraj devizoj sufokis la homan senton en koroj de viroj tiel, ke ili fariĝis senpensa ilaro en manoj de arbitra regantaro, kiam oni triviale profanis la religion kaj moralecon por sukcesigi perforton, kiam scienco, perfidinte sian noblan taskon, akceladis pli sagacan kaj pli efikan mortigadon kaj detruon.

Nun, kiam la cirkonstancoj esence ŝanĝiĝis, kiam estas eble libere esprimi kaj realigi niajn opiniojn, kiam oni vidas, kien gvidus la indiferenteco, ĉu povus ni permesi novan detruon de ĉio homa, novan kripligadon kaj mortigadon de niaj karaj? Ne! — La pasinteco nin instruu eviti malnovajn erarojn! Ni ĉiuj kuniĝu por kontraŭbatali militon! En ĉi tiu memorinda tago ni faru solenan promeson, ke ni „en laboro paca ne laciĝos", ĝis tute malaperos la militoj kaj la interna paco ekregos ĉie, ankaŭ en niaj koroj! Ni pruvu tion praktike! — Rilate la socialan kunvivon ni penu kvietigi la socialan disharmonion, per unueca kunigo de opaj ŝtatoj ni laboru por firmigi la tutmondan pacon kaj subtenu la Ligon de Nacioj por potencigi ĝin tiel, ke neniu ŝtato povu memvole ekmiliti.

Tiun ĉi laboron partoprenu ĉiu, viro aŭ virino! Se ni volas, ke la mondmilito estu efektive jam la lasta milito, *ĉiu fariĝu almenaŭ membro de iu paca organizaĵo!* Ankaŭ tio estas grava, aŭdu ni la opinion de iu nepre serioza gazeto: „Se estus la pacifisma movado estinta antaŭ la mondmilito *movado popola,* se estus en la pacaj organizaĵoj grupiĝintaj miloj da homoj, neniam estus okazinta la terura tutmonda sangadramo, ĉar la registaroj ĝin certe estus primeditintaj, se ili estus vidintaj amason da homoj pacifiste organizitaj!"

Tia tago, kia estis la fatala 26a de julio 1914 neniam plu ripetiĝu!

**Universala Esperantista Pacifista Ligo**
ĉeĥosl. ĉefkomisiito K. Koutek, Praha

**Paca Societo de Chelčický, Praha,**
esper. sekr. V. Echtner,
adr.: Praha II., Hálkova 7.

*ĈU VI ESTAS ANKAŬ EN 1924 MEMBRO DE Ĉ. A. E. KAJ U. E. A.?*


*JULIO BAGHY:*

# AŬTUNE SUB LA KVERKO

Originale por „La Progreso“.

En la subira lumo de l'suno aŭtuna
revojn perdinte mutas sub kverko maljuna
tri fratinetoj, palaj vaksflave sulkfruntaj,
en modpasinta pompo kun kufoj
frangpuntaj.

„Hja hja!... Kruela vivo!“ — la kufoj
kapjesas.
Vangojn de l' tria flirta rideto karesas
kaj ek-ekbrilas ŝiaj laclarmaj okuloj:
„Jes, ĉar forgesis vivi vi laŭ vivreguloj.“



El Moravia Karsto

Laca silento... Falas velkintaj folioj...
Siblas tremvoĉe florenterigaj arioj...
La tri fratinoj sidas... kaj sidas rigide...
Plendoj korfundaj ploras, ĝemflugas
senbride.

„Min jam muelis zorgoj“. — ekĝemas
l' unua —
„Kudri kaj fliki ĉiam ĝis horo malfrua:
jen mia vivo... Poste?... nur plendi,
atendi;
faron — nefaron pesi skrupule kaj —
penti...“

„Jes ja! Mi same vivis — la dua
meditas —
virte virgecon, kiun nun oni priridas...
Lento ĉarmeta iĝis harhava veruko,
brustan doloron flegas sebgrasa
lantuko...“

„Kaj vi?!... Vi same vivis!... Riproĉo
ridinda!
Ĉu vi eĉ por spegulo fariĝis jam blinda?
Prenu!... Rigardu vin!... Ah, fanfaro
senhonta!
Sulkoj... dentmanko... griza la haro
orblonda...“

Lipoj de l' tria mildan riproĉon nun havas:
„Sulkoj, dentmanko, grizo jam tute ne
gravas...“
Honto pasanta ruĝe sur vangoj ekflamis,
sed ŝi fiere flustras: „ĉar... foje... mi —
amis.“

Muta konsterno... Tremas indigne la
kufoj...
„Ah, hipokrito! Honto je niaj blanktufoj!“
Unu veadas sible, alia svenkrias,
sed en korfundo ambaŭ — la trian envias

kaj en subira lumo de l'suno aŭtuna
revojn perdinte mutas sub kverko maljuna
la du fratinoj, palaj vaksflave sulkfruntaj,
ĉar jam la trian lulas — memoroj korfundaj.

## KRONIKO EL ĈEĤOSLOVAKIO

**Oficiala raporto de Ĉsl. Asocio Esp.**
laŭ senditaj informoj.

**Kurso pro soldatoj.** Sekve de la propaganda parolado de S-ro prof. Šprinc, en aprilo en Olomouc, S-ro lernejestro Neužil aranĝis ĉe aviadista regimento novan paroladon en majo kaj kurson, kiun komencis vizitadi 35 aviadistoj-soldatoj. Estus dezirinde imiti ilin ankaŭ alilande.

*A. K.*

**Praha.** E Klubo kunvenas ĉiuvendrede post la 20a horo en kafejo Edison, II. etaĝo, angulo Příkopy kaj Můstek. Gastoj plezure akceptataj. La 11. Julio vizito de S-ro Majorkiewicz, profesoro el Danzig.

**Praha.** Rondeto de esp-istinoj partoprenis en la ekskurso al Poděbrady la 20/7 per sia prez. F-ino Hlaváčová kaj S-ino Hofmannová. Rondeto kunvenas ĉiusabate en Ženský klub (Jáma).

**Jaroměř.** Dum unusemajnaj festoj okaze de fondo de Domo de sociala zorgo, la E. Klubo aranĝas, laŭ invito de la organiza komitato, esp. ekspozicion kaj propagandon la 26-27 Julio.

**Třebíč.** „Esperantista Rondeto de gimnazianoj" aranĝis la 25an de junio sian ĝen. kunvenon. Estis elektitaj: prezidanto: Sro Jan Jaroš, gimnaziano, sekretario: František Kubica, gimnaziano. En lernejaj ferioj membroj de la rondeto ne kunvenas.

**Vamberk.** S-ro Sklenčka gvidas kurson por 103 okupitoj ĉe granda fabrikejo de tekstila firmo. La firmo mem presigis flugfoliojn pri la kurso kaj aliĝojn akceptas la fabrikeja oficejo, ĉio laŭ ordono de la posedanto de la firmo, kiu konatiĝinte kun la nuna stato de esperanto kaj UEA, intencas uzi ĝiajn servojn en sia komerca praktiko.

**Esperantista ekskurso al Poděbrady.** Esper. Klubo en Praha uzas la somerajn dimanĉojn por viziti la lokojn, kie la movado devus esti plifirmigita. Krom Kladno (la 6/7), kie sole 2 membroj de tiea Klubo venis por akcepti ilin, la 25 klubanoj kaj 2 m. de E. Rondeto vizitis dimanĉe, la 20/7 la belan banurbon Poděbrady, kien venis krom tio pluaj 27 samideanoj el 16 lokoj (Nymburk 8, Hradec Král. 3, Hora Kutná 3, Jičín 2, po unu el Pardubice, Kopidlno, Kolín, Kostomlaty, Kosmonosy, Ml. Boleslav, Přelouč, Plzeň, Hořice, Přední Lhota u Poděbrad, Poděbrady (S-ro V. Budínský, malnova samideano) kaj gasto el Polička. — Matene inter 11-13 horo paroladoj de S-roj Bouška, Hromada kaj Sklenčka okazis en salono de Občanská Záložna. La bangastoj kaj loĝantaro preferis promeni, venis sole kelkaj personoj kaj 1 idisto, kiu ankaŭ parolis Post komuna tagmanĝo en banrestoracio, 50 personoj kunvenis sur teraso de kastelo. Estis priparolita stargo de la movado en Poděbrady, antaŭkongresaj aranĝoj en Praha, postkongresaj karavanoj en ĈSR, rabatoj k. a. Samideanoj el Poděbrady kaj ĉirkaŭaĵo, kiuj ne partoprenis, estas petataj sciigi siajn adresojn al S-ro Jar. Pauk jun. en Jablonné n./O.

**XVIII. regiona kunveno de orientbohemiaj** esperantistoj okazis la 13. Julio en Jablonné n./Orl. Partoprenis 42 p. el 15 lokoj. Malfermita de S-ro Jar. Pauk, loka aranĝinto, prezidata de S-ro Sklenčka. Protokolis S-ro Kožený el Mladá Boleslav. La regiono eldonis flugfolion varbantan por organiziĝi en loka kaj nacia organizaĵo kaj en UEA. Ĉiuj samideanoj de orienta Bohemio sendu sian adreson al S-ro Jar. Pauk, junior, Jablonné n. Orl., por ke la regiona adresaro estu plej eble kompleta. — S-ro Sklenčka klarigas la aferon de flugfolioj dissendataj de E. K. Pardubice kontraŭ la kongreso en Liberec. — Estas legata letero de ĈAE pri rabatoj kaj aranĝoj por kongresanoj en ĈSR. — Respondante la demandon pri la jarlibro de UEA, S-ro Sklenčka informas, ke pakaĵoj kun 1000 jarlibroj por ĉs. membroj foriris jam el Leipzig, sed ĝis nun ne alvenis, pro nekonata kaŭzo, nun esplorata. — S-ro Echtner (Praha) informas pri disvastigo de esp. movado inter blinduloj. — La kunsido daŭris de 10·45 — 13a horo. La venonta 19. kunveno okazos en Choceň, la 5. Oktobro. La 20a (jubilea) en Hradec Král., vintre.

**Regiona kunveno de nordmoraviaj esperantistoj** okazis la 29. Junio en Hranice. Ĉeestis ankaŭ samideanoj el Mor. Ostrava, Olomouc kaj Přerov. La programo konsistis el promenadkoncerto, laborkunveno kaj akademio. Regula laborkunveno ne povis pro diversaj kaŭzoj okazi kaj oni priparolis la plej necesajn aferojn dum la tagmanĝo kaj paŭzoj. Inter aliaj oni akceptis la proponon ke Ĉ. A. E. kaj E. J. en Praha intervenu ĉe la ministerio de ĉsl. ŝt. fervojoj, ke ankaŭ al membroj de esperantistaj societoj estu konsentita rabato de 33% ĉe iliaj vojaĝoj kaj ekskursoj sur la fervojo, kiel tion posedas skoltoj kaj similaj societoj, ĉar ankaŭ esper. societoj havas taskon edukadi speciale junularon. U. E. A. gajnis en Hranice novan delegiton, komerciston S-ron Charbulák, kiu zorgas pri varbado de novaj membroj en la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. La akademion malfermis la prezidanto de la societo, kuracisto S-ro Dro Levy per entuziasmoplenaj vortoj, post kiuj sekvis tre bele prezentitaj kantoj de virhoro „Svornost" kaj muziko de S-inoj Chmelařová kaj Šafránková el Přerov, brue aplaŭditaj. Meze de la akademia programo diris ĉeĥan propagandan paroladon „Neŭtrala lingvo en internaciaj rilatoj" S-ro Prof. Šprinc el Olomouc. Lia konvinkiga parolado estis entuziasme akceptita. Oni konstatis, ke la juna societo en Hranice estrata de Dro Levy kaj tre vigla sekretario Sro Bryndač troviĝas sur bona vojo kaj promesas seriozan laboron por la estonto.

*A. K.*

## DIVERSAJ INFORMOJ

— Tiu ĉi n-ro havas sole 8 paĝojn, sekve de la troa okupiteco pro kongresaj antaŭaranĝoj. Pro tio ni devis forlasi kelkajn rubrikojn: El scienco (kun bonega artikolo de S-ro Riedl), Lingva fako kun traduko de la VII. teksto kaj vortaro kaj Bibliografion. La venonta n-ro, kiu estos lasta de tiu ĉi VII. jarkolekto, aperos la 22. Septembro en rekompense pli granda amplekso kaj enhavos raportojn pri la XVI. kongreso en Wien.

— Ĉiam ankoraŭ ŝuldas al ni la abonpagon du trionoj el personoj, al kiuj ni sendis admonilon kaj pagilon La ŝuldata sumo reprezentas kelkajn milojn da kronoj. La ĝustatempa pagado grave faciligus nian situacion, ne nur financan, sed ankaŭ redakcian, ĉar anstataŭ ripete zorgi pri nepagantoj, ni povus dediĉi la tempon por pliperfektigo de la gazeto, kiu jam nun estas kritikata kiel unu el la plej bonaj.

— Eksterlandajn ŝuldantojn ni atentigas, ke ili povas sendi la abonon en rekomendita letero.

— Portu la insignon! Vizitu samideanojn de loko, kien vi venas kiel turisto, bangasto, komercisto k. s. Precipe slovakiaj kluboj atentigas nin pri tio. Vi faros al ili bonan servon, vizitante ilin.

— Vizitantoj de Praha, legu en tiu ĉi n-ro kiam kaj kie kunvenas Prahaj kluboj. Vizitu S-ron Novák, horloĝiston, Malé nám. 10, proksime al Malnova Urbdomo. Dezirante paroli kun ĝen. sekr. de Asocio, S-ro Hromada, telefonu al 5097 aŭ al S-ro Ginz vicdel. de UEA 3873, 9132, — Inter la 6. Aŭgusto kaj 3. Septembro ili ambaŭ ne estas en Praha. Skribu tiam al S-ro Fr. Fryml, fabrikejo Daňkovka, Karlín, Královská (telefono 6810 ĝis 6813 aŭ 7875) aŭ al S-ro Fr. Mothejzík, sekr. de E. Klubo, Praha-Žižkov, Kolárovo nám. 24. (tel. poŝtoficejo Vinohrady 1.).

## PROPAGAČNÍ ODBOR

**O nevyhnutelné nutnosti zavedení světové mezinárodní řeči** píše poslední číslo amerického Journalu of the National Education Association. Ukazuje podrobně, že žádný z živých jazyků se k tomuto účelu nehodí pro složitost své mluvnice. U latiny, kterou někteří navrhovali, přistupuje ještě nedostatečnost slovníková. Z plného sta projektů na umělou řeč jediný návrh dra Zamenhofa z Varšavy se osvědčil v praxi dokonale. Esperanto jím sestavené se osvědčilo již na velkém množství sjezdů a zvítězilo nad nejnovější umělou řečí, několika učenci sestavenou (Idem), již tím, že šiřitelé Esperanta se vždy řídili jen svým nadšeným idealismem mezinárod. prospěchu, který z užíváuí této řeči může vzejíti. Dosáhlo veliké rozšířenosti a proto je jedinou řečí umělou, která nevylučujíc jazyků národních stala se opravdovým pomocným jazykem pro bezprostřední styky mezinárodní. Ukazuje pak k okolnostem, že tisíce turistů užívají esperanta na svých cestách s prospěchem, že v mnohých městech evropských jsou zaměstnáváni policisté esperanta znalí, že mnoho studentů rozšiřuje své vědomosti o cizích zemích pomocí této řeči, jakož i pomocí knih a brožur v ní vydaných, kterých již jest vydáno na tisíce. V dalším poukazuje na zavedení esperanta jakožto dorozumívacího jazyka v organisaci mezinárodních vzorkových veletrhů a na osvědčení se esperanta nejen na sjezdech esperantistů samých, ale i na mezinárodních sjezdech, zejména obchodních. Ukázkou uvádí letošní dubnový obchodní sjezd v Benátkách, kde se súčastnilo 200 úředních zástupců, 89 obchodnických komor, 30 spolků turistických, 21 mezinárodních správ veletržních a přes 60 svazů průmyslových ze 23 států. Při tomto sjezdu celý třídenní program byl projednáván úplně v esperantu, ač někteří z řečníků se jazyku tomu naučili teprve cestou ke sjezdu. Poukazuje na užívání esperanta i Svazem národů, Mírovou společností, Červeným křížem a jinými mezinárodními institucemi, žádá, aby učitelstvo se staralo nejen samo o ovládnutí této velmi snadné řeči, ale i o zavedení jí do škol amerických. *Em. Lippert. (Nár. Pol. 27. června 1924.)*

### MORTIS

S-ro Bohumil Ludvík, faka instruisto kaj delegito de UEA en Kostelec nad Černými Lesy, la 25. Junio 1924. Esprimante kondolencon al iiaj gepatroj kaj gefratoj ni multe bedaŭras la subitan foriron de la diligenta pioniro.

## LASTA INFORMO

### Pasportaj faciligoj

Ĉiuj „okresní politické správy" ricevis en la lastaj tagoj cirkuleron de la 17./7. N-ro 49.617/V. pri tio, ke pasporto por vizito de la XVI. estu donita al personoj prezentantaj kongresan karton kaj personan dokumenton. Ne estas necese prezenti ateston pri pagitaj impostoj, nek permeson de armeaj oficoj. La pasporto povas esti ricevita en 15—30 minutoj.

Soldatoj povas ricevi laŭ tiu cirkulero forpermeson por viziti la kongreson, se la gravaj deĵoraj cirkonstancoj ne malhelpas.


Ni rekomendas al vi la jenajn

**Librojn de Hirt & Sohn Leipzig**

| | Kč |
|---|---|
| **Internacia Mondliteraturo.** Sbírka 15 svazků vhodné četby, 70—80 str. po | 8·— |
| 1. Goethe Hermano kaj Doroteo, | |
| 2. Niemojewski: Legendoj, | |
| 3. Turgenev: Elektitaj noveloj, | |
| 4. Raabe, La Nigra Galero, | |
| 5. Hildebrand, El la „Camera Obscura", | |
| 6. Irving: El la skizlibro, | |
| 7. Chamisso: La mirinda historio de Petro Schlemihl, | |
| 8. Ŝtamatov: Nuntempaj rakontoj, | |
| 9. Ŝalom-Alehem: Hebreaj rakontoj, | |
| 10. Puŝkin: Tri noveloj. | |
| **Stranga Heredaĵo** [Luyken] orig. román 320 str. | 24·— |
| **Abismoj** [J. Forge] orig. román 150 str. | 14·— |
| **Internacia kantaro** [Bennemann] 64 písně . . . text | 4·— |
| noty | 13·— |
| **Enciklopedia Vortaro** [Wüster] I. parto [A-Ĉ] 160 str. | 100·— |
| **Esperanto-Deutsch,** slovník od Bennemanna 176 str. váz. | 28·— |
| Lippman: **Lingvaj respondoj de Dr. Zamenhof.** Něm. zpracování s doplňky a vysvětlivkami 70 str. | 7·— |
| **Historio de Esp.** [Privat] 74 str. | 12·— |
| **Vivo de Zamenhof** [Privat] 109 str. | 15·— |
| **La Vendreda Klubo.** 11 orig. čl. 115 str. | 12·— |
| Thora-Goldschmidt: **Bildotabuloj.** 36 36 bildoj kun teksto. 104 str. | 20·— |

**Obstará adm. LA PROGRESO**

**PRAHA VII.-333.**

Ĉu vi jam aliĝis al

## Universala Esperanto Asocio?

(Genève 12 Bd. du Theâtre.)

Kiel *membro* (20 Kč jare) vi ricevos 300 paĝan ***Jarlibron*** kaj rajtos uzi servojn de la Delegitoj en la tuta mondo. Kiel *membro-abonanto* (45 Kč jare) vi *krom tio* ricevas 24 p. monatan revuon

**Esperanto.**

Petu aliĝilon kaj pagilon ĉe Adm. de La Progreso, Praha VII., Sochařská 333.

## Opatříme Vám následující knihy:

| | |
|---|---|
| Fundamento eldono 5 lingva | Kĉ 8·— |
| Fundamento, kun ĉeĥa trad. | „ 3·— |
| Fundamenta Krestomatio 460 str. | „ 24·— |
| Fabeloj de Andersen | „ 16·— |
| Georgo Dandin | „ 8·— |
| Hamleto, Shakespeare, 170 str. | „ 14·— |
| Ifigenio, Goethe, 108 str. | „ 16·— |
| Proverbaro esperanta, 82 str. | „ 11·— |
| Rabistoj, Schiller, 144 str. | „ 11·— |
| Revizoro, Gogol, 100 str. | „ 11·— |
| Esenco kaj estonteco de la lingvo internacia, esp.-france | disvendita |
| Genezo, Eliro, Levidoj, Nombroj, Readmonoj po | Kĉ 8·— |
| Sentencoj de Salomono | „ 5·— |
| Predikanto | „ 2·50 |
| Faraono, Bol. Prus, 3 sv. 600 str. po | „ 16·— |
| Fundo de l' mizero, Sieroszewski | „ 4·— |
| Pola Antologio, krátké povídky | „ 8·— |
| Halka, opera, text | „ 5·— |
| Interrompita kanto | „ 4·— |
| Salome de Wilde | „ 2·— |
| Bulgara lando | „ 12·— |
| El proksima oriento | „ 9·— |
| Rakontoj de Arbes, 135 str. | „ 6·— |
| Koboldo Ondra, Mahen | „ 5·— |
| Ĉeĥa literaturo. Dr. Novák Arne | „ 8·— |
| Tra la mondo II. čítanka | „ 10·— |
| Bukedeto, 7 povídek, 48 str. | „ 4·— |
| La Esperantisto en Germanio | „ 20·— |
| Moravia karsto | „ 5·— |
| Tittl: Vortaro esp. ĉeĥa váz. 7·50) | Kĉ 5·— |
| Kühnl-Procházka: Slovník česko-esp. | „ 20·— |
| Kabe. Enciklopedia vortaro, 175, váz. | „ 22·— |
| Verax: Vortaro (techn. slova) váz. | „ 32·— |
| Boirac: Plena vortaro esp. 3 sv. | „ 50·— |
| Wüster: Maŝinfaka vortaro | „ 15·— |
| Kamaryt: Jazyk mezinárodní | Kĉ 8·— |
| Kotzin: Na obranu esperanta | „ 3·— |
| Šupichová: Učebnice esp. | „ 9·60 |
| Žďárský: Učebnice esp. | „ 20·— |
| Bouška: Škola esperanta, úplná | „ 30·— |

*Obstaráme za předem zaslaný obnos plus 10 procent porta, mimo daně z obratu.*

**LA PROGRESO, Praha VII., Sochařská 333.**

ABONU LA GAZETON

## ESPERANTO TRIUMFONTA

*

*Semajna, Aktuala*
*Grandformata*
*Ilustrata*
*Senpagaj monataj aldonoj:*
*»REVUO«*
*(literatura kaj popolscienca)*
*»INTERNACIA KOMERCO«*

*

Senpagan specimenon petu de la

**ADMINISTRACIO, HORREM BEI KÖLN GERMANLANDO**

**AGENTOJ POR ĈEĤOSLOVAKIO:**
**Otto Sklenčka, Hradec Králové kaj**
**Otto Lumpe, Trutnov.**

Al ĉiu *literaturamanto* *propagandisto* *serioza esp-isto*

**abonu**

la monatan, bele ilustritan revuon

## Literatura Mondo

Red. kaj Adm.:
Budapest VI. Andrássy ut. 81

Jarabono (10 n-roj) 10 fr. sv. aŭ 45 Kĉ
Ponumera pago (4·50 Kĉ) ebla ĉe la Administracio de La Progreso.

Eldonanto kaj responda redaktoro RUDOLF HROMADA. — Presis JAN MINÁŘ A SPOL. NYMBURK.

KUL